

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-o 37, 19. Junio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Nova Triligo?

Anglujo, Francujo kaj — Germanujo.

La angla ministro Churchill faris dum festeno, per kiu la komerca ĉambro de Manchester lin honoris, konsiderindan paroladon pri la restarigo de vera paca stato en Eŭropo. Kiel unua li deklaris malkaŝe, kio en la entanta gazetaro jam delonge estas pli-malpli kaŝe aludita: la sola garantio por daŭra paco bazas sur sincera kunlaborado inter Grandbritujo, Francujo kaj — Germanujo, por rekonstrui sur la ruinoj de l' milito kaj por restarigi la unuecon de Eŭropo.

Churchill akcentis, ke Ameriko fariĝis la plej granda kreditoro, Germanujo la plej granda debitoro. La germana industrio laboras intense por pagi siajn ŝuldojn; ĉar, krom karbo, ĝi ne posedas konsiderindan krudmaterialon, ĝi estas devigata liveri fabrikojn por ĉiuj merkatoj de la mondo. Se Germanujo sukcesos pagi ĉiujn ŝuldojn dum 40—50 jaroj, ĝi fariĝos la plej granda eksportanta lando de l' tuta mondo kaj detruos per tio la industrian de la aliancanoj. Usono, se ĝi ricevis siajn tutmondajn kreditojn en formo de komercaĵoj, detruus sian propran eksportkomercon.

Por eviti tiajn malutiligajn konsekvencojn de l' packontrakto, la riparo de la militdifektoj devas okazi per sincera kunlaborado inter Anglujo, Francujo kaj Germanujo. Tia unuigo estas necesaj jam sole por subpremi la militprojektojn ekzistantajn ankoraŭ ĉiam en vastaj randoj de Germanujo. Tiaj venĝprojektoj estas pli danĝeraj por Francujo ol por Anglujo. Tial Anglujo devas esti peranto inter Francujo kaj Germanujo, rilatante sincere al Francujo sed ne maljuste kontraŭ Germanujo. Nur tiamaniere povas esti certigata la paco.

Kiel oni scias, la angla registaro malakceptis antaŭ kelkaj tagoj francan proponon por alianco; ankau Churchill estis parolinta kontraŭ tia intima interligo kun Francujo. El lia nuna parolado oni povas konstati, ke li tute komprenas la timon de Francujo por germana venĝomilito, ke tamen la rimedon kontraŭ tia estonta evoluo de l' eŭropaj aferoj li vidas ne en franca-angla, kontraŭ Germanujo direktata alianco, sed en la kunigo kaj kunlaborado de ĉiuj tri ŝtatestoj.

Precipatan atenton meritas la fakto, ke ĝuste Churchill, antaŭe unu el la plej fanatikaj malamantoj de Germanujo, pledas por novorientiĝo en la eŭropa politiko.

La nuna kolonia ministro estas unu el la plej influikaj membroj de la nuna brita ministaro kaj esprimis per sia parolado en Manchester ne nur

sian propran opinion sed ankaŭ tiun de la registaro de Lloyd George. Se la propono de Churchill por kunlaboro inter la tri plej potencaj nacioj de Eŭropo trovas bonakcepton en Francujo, tio per unu bato alligis la politikan situacion en Eŭropo. La eventuala kunigo de la tri grandaj ŝtatoj povus konduki al vera paco kaj al sanigo de la tuta eŭropa ekonomia vivo.

Ankaŭ nin esperantistojn interesas la parolado de la granda angla ŝtato en alta grado. Vere, ĝi estas por ni celantoj internacian pacon kaj konkordon lumbrilo post malhela nokto. Sed ĉu la bela iniciato efektiviĝos? Ni kore deziras, ke jes; sed ni havas sufiĉe da kaŭzo por supozi, ke ne.

Ĉiukaze, ni ĝojas, ke iom post iom pli afablaj, pli agrablaj voĉoj aŭditiĝas en la internacia koncerto, ke iom post iom la nacia fanatikeco, la ŝovinismo cedas al pli reala, pli racia konsiderado. Kaj tio jam estas multvalora.

Ankaŭ en la scienco la baroj komencas fali. Profesoro Einstein trovis entuziasman akcepton en Anglujo, kaj Lordo Haldane diris en Londono, salutante la faman germanan gasion, ke „la scienco ne konas limfostojn“.

Do ni ĝoju, la „nova sento“ de modereco kaj prudento, kiu iom post iom ŝajnas veni en la mondon, „triligu“ (tril-igu) nin denove nian esperantan kanton! Kaj se ankaŭ la supozata kaj certe dezirinda Tri-Ligo versajne ne efektiviĝos, tamen ni esperantistoj de diversaj nacioj restu bonaj, sinceraj, komprenemaj amikoj. Ni la politikan en nia esp. gazetaro, ni faru tion ĉiam kun sufiĉa respekto por nia propra nacio sed kun la sincera intenco ne ofendi aliancanojn kaj trovi vojojn kaj rimedojn por, se eble, kontentigi ambaŭ partiojn.

R-ano.

La unua Ika-Kongreso por Germanlingvujo.

Samtempe kun la X-a Germana Esp. Kongreso okazis de la 14-a ĝis 17-a de majo en Essen la Unua Kongreso de Internacio Katolika (Ika) por Germanlingvujo, sub la gvido de l' subsigninto. Ambaŭ ĉefkongrestagoj, la 15-a kaj 16-a de majo, ricevis apartan benon per esp. diservo en la preĝejo de S-ta Jozefo. Ambaŭtage predikis misia pastra moŝto s-o d-ro M. J. Meŝger el Graz esperantlingve pri la festevangeliĝo, kaj la unuan fojon en katolika preĝejo de l' okcidenta Germanujo eksonis la mondhelpingvo Esperanto, kiu, estante moderna Pentekosta miraklo, kompletigas la unuecon de la koroj de l' katolikoj tutmondaj per la

unueco de la langoj. Eĉ ne-esperantistoj devis sin allasi al la impona impresado de ĉi tiuj esp. predikoj. Kapiite, korusite ĉiu atente aŭskultis la vortojn de l' predikisto, kiu mirinde sukcesis transigi sian amon al la sankta Eklezio kaj al la homaro je la koroj de siaj aŭskultantoj. Kiel moderna Paŭlo la predikisto akonigis, ke la katolika Eklezio, ĉiam preta akomodi sin al la nuntempaj bezonoj, ankaŭ devas uzi la efikan rimedon de popolunua helpingvo, se temas rekonduki la mondon delogitan en malamon, malamikecon kaj materialismon al Kristo, kiu instruis kiel plej superan ordonon al siaj disciploj: „Ut omnes unum“, por ke ĉiuj estu unu, kaj: „Je tio oni ekkonos, ke vi estas miaj disciploj, se vi amos unu la alian elkore“.

La laborkunsidoj de la kongreso estigis principojn por la plua evoluo de Ika en Germanlingvujo. Estis nomata germana landkomitato de Ika, konsistanta el: supera poŝsekr. Klein-Essen, germana landdirektoro de Ika, gimn. instr. Mielert-Breslau, prez. de „Buked“, kaj d-ro Grundel-Berlin, afergvidanto de la pacligo de germ. katolikoj.

Jen la grandaj celoj realigitaj: Temas

1. ke la grandaj ĉefligoj aliĝu al Ika kiel eksterordinaraj membroj per jarkotizo de 2 pfg., havante la rajton ensendi en la germ. landkomitaton 1—2 reprezentantojn;
2. ke la lokaj unuigoj de ĉi tiuj ĉefligoj aliĝu al Ika kiel ordinaraj membroj per jarkotizo de 20 pfg., ricevante la rajton elekti lokajn fakdelegitojn de Ika kaj uzi la helpilojn de la agadcentroj de Graz;
3. ke kiel eble plej multaj anoj de ĉi tiuj lokaj unuigoj aliĝu senpere al Ika (= lokaj grupoj) kiel individuaj membroj por aktri tiamaniere la rajton apliki ĉiujn helpilojn de Ika, precipe la profitojn de la delegitosistemo, kiu celas havigi kiel eble plej grandajn reciprokajn subtenojn okaze de vojaĝoj en- kaj eksterlandaj kaj senpagajn skribajn informojn ĉiuspecajn;
4. perfektigi la organon de Ika „Espero Katolika“ refoje benita de la papoj Pio X-a kaj Benedikto XV-a kaj aperanta sub la protektoreco de la kardinala ĉefepiskopo d-ro Piffel en Wien, por ke ĝi fariĝu la gvidanta internacia semajna gazeto de la katolika mondo;
5. ke la katolikaj ĝejuuloj per aliĝo al „Moka“ (Mondjunularo Katolika) estu interesataj kaj instruataj por la taskoj kaj problemoj de Ika.

La plej grava kongreskunsido estis la publika por-Ika-kunveno la 17-an de majo. Ĝi estis gvidata de la prezidanto de l' Essen'a Ika loka grupo advokato d-ro Hinzenkamp, kiu precipe salutis d-ron Meŝger el Graz, la oratoron de la vespero kaj ĝen. sekr. de Ika, plue la subsigninton kiel

„Rigardu!“ diris Mateo al Anna. „Jen kiel ĉi tie vivas niaj gesinjoroj, — kion diri pri simpluloj?“

„Nu“, respondis John, „vi ankoraŭ ne konas la landon, Mr. Mathew“. Kaj li eniris en la unuan ĉambron, senĝene sidigis, alŝovinte ankaŭ por Anna seĝon.

Mateo severe alrigardis la malmodestan junulon, kaj li same kiel Anna restis stantanta ĉe la sojlo. Mateo malamis la junan hebreon de post ilia interparolado pri religio. Krom tio li ne povis ne rimarki, ke lohn estis restas helme, helpas al la knabinoj en la mastrumado kaj plezure vidas Anna'n. Verdire, la knabino estis bela: bluaj okuloj, grandaj kaj klaraj, milda rigardo, afabia rideto kaj delikata vizaĝo, certe, iom pala pro la vojaĝo laciĝo kaj la necertezo pri ŝia situacio. Neniu el la sentaŭguloj, loĝantaj ĉe Mr. Bork, permesis al ŝi eĉ unu frivolaĵon rilate la knabinojn. Tamen, krom Dima, kiu fanfaronadis antaŭ ŝi en sia groteska jako, ankaŭ Paddy ĉiamaniere penadis servi al ŝi, kiam li ŝin renkontis en la koridoro aŭ sur la ŝtuparo. Nun venis al Mateo en la kapon la rakonto de Bork pri Mozes...

Ĉio povas okazi, pensis Mateo. En ĉi tiu lando neniu zorgas pri tiaj aferoj. Jen nia Dima, kamarado malnova kaj provita, tamen kiom ŝanĝiĝis lia karaktero en la daŭro de unu sola semajno! Kio do povas fariĝi el juna nesperta knabino, eble iomete facilanima, kiel ĉiuj filinoj de Evo... Malbonaĵoj ŝi, certe, ne faros... Sed ĉi tie ankaŭ la bono neniam valoras, kaj la knabino ja estas juna, nesperta, timema.

Ekmemorinte ankoraŭ sian songon, Mateo ekĝemis kaj ĉirkaŭrigardis.

(Daŭrigota.)

La Senlingvo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

(25-a daŭrigo.)

„Nebonan planon vi elpensis,“ flame sin enmiksas la juna hebreino. „Ni konas tiun sinjorinon. Ŝi ĉiam deziras dungi novalvenintajn...“

„Dio rekompencu ŝin pro tio,“ malvarme diris Mateo.

„Sed la fakto estas,“ ree diris Roza, „ke ŝi tro malmulte pagas.“

„Ŝi ne permesos, ke oni mortu pro malsato.“

„Kaj ŝi postulas tro multe da laboro.“

„Dio volas, ke oni laboru...“

Mateo alrigardis Roza'n fiere kaj malsate. Por la hebreino ĉi tiu principo de kristanoj jam ne estis novaĵo. Al ŝi ŝajnis, ke ŝi sentas amikecon al Anna kaj simpatian al la meditema blukola Loziŝcano. Sed nun ŝi rugiĝis kaj diris:

„Faru, kiel vi volas...“

Kaj ŝi eliris el la ĉambro.

„Nia malbono estas pli bona, ol la ĉi tiea bono,“ edife diris Mateo, sin turnante al Anna.

„Preparu viajn aĵojn. Ni iros hodiaŭ.“

Anna ekspiris, tamen ŝi obeeme prepariĝis por foriri. Al Mateo ne plaĉis, ke, adiaŭante la hebreinon, ŝi ame ŝin kisitis, kiel fratinojn.

XV.

Hodiaŭ ili denove marŝis kun sia pakajo tra la stratoj de Nov-Yorko, same kiel en la tago de ilia alveturo. Sed ĉi tiun fojon ilin ne akompanis Dima, kiu, de longe defeminte sian blankan kifelon kaj amikiĝinte kun irlandanoj, nun eĉ ne scias pri la planoj de siaj samlandanoj. Sed Mateo kaj

Anna restis samspektaĵaj: li surhavis la saman blankan kifelon kun ŝnuretoj, ŝi — la blankan kaptuketon.

La juna John ankaŭ opiniis la projekton de Mateo granda malsagaĵo. Sed, estante amerikano, li ne permesis al ŝi sin enmiksi en fremdajn aferojn, kaj li nur fajfatis por malkontento, akompanante nun Anna'n kaj Mateon.

Komence ili piediris, poste du ĉevaloj trenadis ilin en grandega omnibuso, sine ili supreniris kaj ekflugis tra la aero. El unu frato en alian — longe ili veturis. La domoj fariĝis malpli grandaj, pli simplaj, la stratoj — rektaj, larĝaj kaj senbruaĵaj.

Ce unu angulo ili elvagoniĝis kaj ekiris rekten. Se estus ĉi tie malpli da ŝtonoj, se ie sub ŝtono kreskus herbo, se en la mezo de la strato estus sidantaj infanetoj en malantaŭe suprenlevitaj ĉemizoj, se vagadus meze de la strato almenaŭ unu bovinjo, se ekzistus almenaŭ unu dometo kun fenestroj enprofundigitaj en la teron kaj kun disfalinta tegmento, ĉi tiu strato ŝajnus al Mateo iom simila al Loziŝci. Sed ĉi tie ĉiuj domoj similis unu la alian kiel infanoj durnaskitaj: ĉiuj trietaĝaj, ĉiuj kun plataj tegmentoj, kun samspekcaj fenestroj, samfasonaj peronoj kun sama nombro da ŝtupoj, samaj elstaraj kaj kornicoj: nur la nigra cifero sur malbrila vitro super la pordo distingigis la domojn unu de la alia.

John enrigardis sian notlibreton, trovis la bezonatan numeron kaj premis la butoneton ĉe la pordo. En la loĝejo io krakis. La pordo malfermiĝis, kaj ili eniris la antaŭĉambron. La maljuna sinjorino, kiu atendis sian edzon, mem venis malŝlosi la pordon. Ŝi estis lavanta la plankon. Ŝiaj okulvitroj estis suprenfiritaj sur la fruntoj; sur ŝia vizaĝo vidigis ŝvitaj gutoj, kaj ŝi surhavis nur ĉemizojn kaj malpuran jupon. Ekvidinte la alvenintojn, ŝi foriris por sin vesti.

vicprezidanton de Ika por la centraj ŝtatoj, kaj definatoran moŝton Fuhrmanns de St. Ludgerus (Essen) kiel reprezentanton de la pastraro. D-ro Metzger tiam kondukis per vortoj, brulantaj kiel fajro en ĉiu opa koro, siajn aŭskultantojn paŝon post paŝo al la ekkono pri la neceso de unuigo de la katolikoj kaj katolikaj organizoj ĉiulandaj, al la kompreno plue pri la grandegaj taskoj de la Internacia Katolika kreita en Hago dum la VI-a, al la kompreno fine pri la neceso de katolika helplingvo por la celoj de internacia buŝa aŭ skriba pensinterŝanĝo, por kiu nek la latina nek iu ajn moderna lingvo povas taŭgi. La katolika Eklezio estas la plej granda Internacio. Sed tiom longe, kiom la katolikoj ne estas organizitaj internacie, ili ne reprezentas la forton necesan por havi influon pri politiko, popolrajto, leĝdono, gazetaro ktp. La frazo: „Proletarioj tiumondaj unuigu vin!“ li instataŭis per la postulo: „Katolikoj tiumondaj unuigu vin! Lernu senti, ke vi, internacie organizataj, estas potenco, kun kiu devas kalkuli viaj kontraŭuloj. Havigu al vi antaŭ ĉi internacian katolikajn gazetarojn, kiu liberigus vin de la nekatolikaj telegraf-agentoj.“

Definitoro Fuhrmanns nur elparolis la ĝeneralan senton dirante en la diskutado: „Niaj koroj estas kaplitaj per mirindplena Pentekosto-sento. Temas nun realigi la belegajn vortojn de l' oratoro, liajn konsiliojn praktikajn per senlaca laboro kaj varbado en la katolikaj unuigoj.“

Per fortio plena „Ni eklaboru!“ la gvidanto de la kunveno fermis ĝin post vortoj de plej kora danko al la oratoro alkurinta el granda malproksimo. „Ĝis revido en Breslaŭ!“ estis la adiaŭaj vortoj de la kongrespartoprenintoj; kiuj disiris plenaj de valoregaj pensoj kaj kontentigitaj pri la bela kongreso en Essen. La semeroj plantitaj tie kreskos; neniu dubo! Jam post la Esperantopredikoj 24, ankoraŭ ne-esperantistoj* deklaris sin pretaj partopreni la venontan Esperanto-kurson, kiel rakontis al mi la ĉian laŭdon merita senlaca sekretario de la kongreso, mia kara amiko s-o Klein, al kiu mi krom tio publike dankas pro lia vere fraja gastemeco pruvita al mi dum la belaj kongrestagoj. Ĝis revido en Breslaŭ!

M. Mielert, Breslaŭ.

Pri Politiko en Esperanta Gazetaro.

Raporto pri Supra Silezio en „Esperanto Triumfonta“ elvokis la polemikon kaj postulon (rigardu ET n-o 33 „Paroleto“), ke en estonteco oni evitu similtajn artikolojn en la esp. gazetaro.

Mi konsideras tiun ĉi demandon alie kaj opinias, ke la politikaj aferoj, priskribitaj en „Internacia Esperanto Servo“, ne povas fari ĉian ajn malegablajn por la redaktoro de esperanta gazeto aŭ por tuta gazeto. La legantoj ja kun granda intereso legas tiun fakon kaj plej ofte trovas en ĝi interesindajn novaĵojn kaj sciigojn. Estas vere, ke la priskribanto de Supra Silezio lomete deflankigis kaj uzis la tendencojn; tamen la legantoj por tio pli kulpigis ne la redaktoron de ET, sed la aŭtoron de tiu artikolo*. Kaj ŝajnas al mi, estus dezirinde, se iu alia priskribu Supran Silezion de alia vidpunkto; tiam oni povus vidi pli veran bildon de la efektiva situacio.

Se la esperantistoj ĉie kaj ĉiam penus gardi la neŭtralecon kaj ĉiam evitus politikajn demandojn**, la aplikado de esp. lingvo mem ne trovus en la vivo ĝustan kaj vastan lokon.

Nuntempe okazas tiom da diversaj kongresoj kaj kunvenoj, kaj dum ili estas prifraktataj tiom da demandoj de politika karaktero, ke estas

preskaŭ neeble rifuzigi de politika agado. Se oni ne volas per esp. lingvo diskuti pri politikaj demandoj, tiam ne estas klarigebla la konduto de niaj fervoraj esperantistoj, kiuj volas aligi Esperanton al Ligo de Nacioj, kiu ankaŭ okupas sin pri politikaj aferoj.

Al mi ŝajnas, ke plej bone estus, ĉe Internacia Esp. Servo meti la rimarkon, ke pro la enhavo de tiu ĉi fakto estas respondeca ne la redakcio, sed la aŭtoro ĵemus aŭ subskribinto de artikolo. Tiam oni povus eviti malkomprenigojn. Ankaŭ estus tre dezirinde, ke artikoloj en Internacia Esp. Servo estus subskribataj ne per pseŭdonimo, sed per vera aŭ efektiva nomo de l' aŭtoro, tiel kiel mi, ekzemple, ĉiam faras.

A. Klimas.

Kaunas (Litovio),
Redakcio „Lietuvos Ukininkas“.

* Al tio la redaktoro rimarkas, ke li ricevis skrajn kulpigojn pro tio, ke li enprenis la ĉiitan artikolon pri Supra Silezio. Ankaŭ el Anglujo venis plendo pro akcepto de artikolo kontratalianca el Konstantinopolo.

** Por resti neŭtraj, la esperantistoj ne bezonas tute eviti politikajn demandojn, sed devas pritrakti ilin neper objektive, tre ŝirarde kaj sen ŝovinismo. Eble en iu posta n-o ni montrus vojon, laŭ kiu estus eble pritrakti en esp. ĵurnalo politikajn demandojn, ne forlasante neŭtralecon kaj objektivecon. Red.

Notinda Eksperimento.

En artikolo „One Man's View of Americanism“ en la gazeto „The American Legion Weekly“ 4. marto 1921, s-o Ernest Mc. Cullough skribas pri interesa eksperimento, kiun li faris kun aro da diversnaciaj laboristoj.

Mi foje, li diras, havis entreprenon, en kiu mi devis dungi pli ol kvarcent laboristojn. Ili ĉiuj estis nove alvenintaj alianduloj, plejparte rusoj. Ili ne aspektis inteligentaj kaj ricevis de la intendanto la oportunan irakidon. Mi bedaŭris ilian sorton, kaj aranĝis la helpon de interpretistoj de l' diversaj aliandaj konsulejoj por viziti ilin kaj interparoli kun ili. Oni trovis, ke la viroj reprezentis dek unu lingvojn kaj pli ol kvardek dialektojn. Kvankam ili estis klasifikitaj kiel rusoj, malmulte da ili konis iun rusajn vortojn krom militaj ordonoj kaj terminoj lernitaj dum sia konskripta periodo. Oni aĉetis esp. lernolibrojn por diversaj lingvuloj kaj metis ilin en la manojn de tiuj, kiuj povocitis legi. Oni informis ilin, ke kiam ili povus paroli kaj legi Esperanton, oni plialtigus ilian salajron po dudek kvin centoj por tago. Oni ankaŭ informis ilin, ke tiuj, kiuj instruas Esperanton al la viroj, ricevus du dolarojn por la laboro.

En malpli ol unu monato ĉiu viro estis parolanta la lingvon. La ŝanĝo en spirito estis mirinda. Ne plu la laboristoj estis malkontentaj. Kantoj kaj ridado kaj rapida laboro regis.

Kiam oni esploris, oni trovis, ke estis malmulte da nespartaj laboristoj en la grupo. Oni trovis spertajn ĉarpentistojn, meblistojn, forĝistojn, koloristojn, ŝuistojn kaj buĉistojn. Oni do rearanĝis la grupon kaj elektis intendantojn kun la rezulto, ke granda profito venis el entrepreno, kiu foje ne donis esperon al tio. Per komuna lingvo ĉiuj komprenis, kaj poste, kiam oni devis instrui la anglan lingvon al la viroj, la tasko ne estis malfacila. Eĉ antaŭ tiu momento, oni donis instruon al la viroj pri temoj pri Usono. Tiamaniere ili lernis pri la diferencoj de regado de eŭropaj landoj kaj de Usono. Oni trovis, ke ilia nescio pri tio iom similis tion, kion oni trovas inter mezeinstruitaj civitanoj en Usono. Ili havis nur neklarajn ideojn.

Ni sendis al la viroj cirkuleran leteron, en kiu ni diris, ke ni havas sinceran deziron helpi ilin

Krestomatia) kaj pro tio ankaŭ enhavas ĉiujn erarojn.

Mi kompreneble ne povas jene paroli pri ĉiuj malkorektaĵoj, kiujn enhavas nia klasika literaturo. Mi nur citos kelkajn el la proksimume 400, kiuj troviĝas en la Fundamenta Krestomatio:

La vorto „fariĝi“ tiom enradikiĝis ke preskaŭ ĉiu ĝin uzas en la senco de „verden“ (F.: „devenir“, A.: „become“) kaj nur malmultaj pripensuloj en la lasta tempo komencas eltrovi ke ĉi tiu ideo estas pli trafe esprimbla per „estiĝi“.

Laŭ la Fundamento ĵisto' nur desegnas „personon okupigantan pri“. Oni do trovas „Esperantisto“ (65/25)*, „lingvisto“ (266/20), „frazisto“ (297/24), „statistikisto“ (266/26), „juristo“ (87/11), „kuracisto“ (72/33), sed „servanto“ (108/6) kaj „juĝanto“ (71/13). Hodiaŭ „isto“ nepre signifas „persono profesie okupiganta pri io“. Kaj oni nur povas uzi „ist“ ankaŭ por „neprofesia okupigado“ kun vortoj kiuj esprimas sciencojn kaj artojn.

La prepozicio „gis“, „dum“ ktp. ankaŭ estas uzataj kiel konjunkcioj. Sed „gis mi venos“ kaj „dum mi parolas“ estas nepre malkorektaĵoj! Oni devas absolute diri „gis tiam kiam mi venos“, „dum tio ke mi parolas“ aŭ pli simple „gis ke mi venos“ kaj „dum ke mi parolas“. Se tamen Zamenhof diris „gis la korpo fariĝas ruĝa“ (110/1), „gis ĝi venas al la ponto“ (220/13), „gis la mondo pereos“ (177/16), tio rezultas el tio ke Zamenhof, dum la komenca epoko, multe sin apogis al la Germana lingvo. Oni ankaŭ ne devas aserti: „Se en Germana lingvo sufiĉas uzi unu vorton kiel prepozicion kaj egale kiel konjunkcion, sama tio ankaŭ devas sufiĉi por iom eble plej simpla artefarita lingvo“. Certe, simpleco estas granda

* La interkompilataj duoblaj nombroj post cititaj frazoj montras al la koncerna paĝo kaj linio de la F. K. (65/25) do signifas: F. K. paĝo 65 linio 25.

ĉiel kompreni la Usonajn instituciojn kaj gvidi ilian sukceson en Usono. Ni petis ilin skribi al ni en Esperanto, por fari demandojn pri io, kion ili jam vidis, kaj pri io, kion ili volas scii. Ni promesis, ke oni ne malkaŝos la nomon de iu sen konsento, kaj ke oni preparolos la aferon, pri kiu oni demandas.

La demandoj venis multope. Oni klasifikis ilin, kaj preligis paroladojn pri ili, kaj ilustris la paroladojn per lumbildoj. Oni uzis tre simplajn lingvaĵojn, sed oni ne alparolis al ili kvazaŭ al infanoj. Diskutoj sekvis kaj bonefiks ĉe ĉiuj instruitoj kaj instruintoj. La sekreto estis la uzado de komuna lingvo.

W. M. P., Edinburgh.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

La japana sendito al Praha.

Vendredon, la 25. febr., matene, forveturis s-o Naria, la sendito de la japanaj esperantistoj, al la XIII-a Universala Kongreso. Multaj samideanoj iris al Tokia stacidomo kaj al la kajo de Jokohama haveno por vidi lin forveturi. Ili kantis korse esp. kantojn, dum s-o Naria svingis verdan standardon sur la ferdeko de la vaporsipo forveturanta. Tio aliris intensen atenton de miloj da scivolemaj ĉestantoj.

Esp. Prelego pri Finnlando en Osaka (Jap.).

Fama tagĵurnalo „Osaka Asahi Sinbun“ aranĝis publikajn lekcionojn de ministroj de du novaj ŝtatoj: Finnlando kaj Ĉeĥoslovakio. Matene, la 15. febr., nia senlaca samideano d-ro J. G. Ramstedt, finna eksministro, nuna ambasadoro de Finnlando en Tokio, forveturis el Tokio, akompanata de s-o Ga. Ili atingis vespere la stacidomon de Osaka kaj akceptis viziton de multaj Osakaj samideanoj, kun kiuj ili amike parolis ĝis la 10-a horo.

La 16-an, frumatene, ili vizitis aŭtomobile Komercan Muzeon, prefekton Ikemacu, urbestron Ikegami; havis tagmanĝon ĉe ĵurnalo „Osaka Asahi Sinbun“; vizitis virinan liceon „Soin Jogakko“ en Kosaka ekster al urbo, kie d-ro Ramstedt faris paroladon antaŭ 500 studentinoj.

Post vizito de urbaj vidindaĵoj, ili ĉeestis la bonvenigan kunsidon de la lokaj samideanoj en restoracio Maruman. Sed bedaŭrinde oni jam telefonis, ke la publika lekciono en la salonego de „Asahi Sinbun“ komenciĝis kaj ke ili rapide alvenu. La salonego plenis 700 personoj (pro manko de loko multaj ne povis esti enlasataj) spite la pluvon kaj estis aŭskultantaj la lekcion de ministro ĉeĥoslovaka, angle parolanta kaj japane fuŝtradukata.

Kun aplaŭdo sin prezentis nia s-ano d-ro Ramstedt sur la estrado kaj komencis lekcion „Pri la lando de mi lagoj“ en Esperanto, lerte interpretata de s-o M. Ga. Post duhora lekciono la doktoro prezentis 50 lumbildojn kun interpretado de s-ano A. Takao. La kunsido finiĝis ĉirkaŭ la 10-a vespere.

(Laŭ „La Revuo Orienta“.)

Esp. Grupo en Salzburg.

En Salzburg, belegra urbo en Alpmontaro (vidu ET n-o 26) fondiĝis esp. grupo kun 20 membroj. Prez.: F. P. Huber, Mönchsberg 5.

Kursoj inter Instruistoj kaj Lernantoj en Fürth.

En Fürth (Bavario) Esperanto estas fakultative enkondukita en la progresivan lernejon: partoprenas 50 infanoj. Alian kurson partoprenas 25 geinstruistoj.

La hodiaŭa stato de Esperanto

de Karlo Minor.

Oni ofte legas kaj aŭdas, ke iu frazo, esprimo aŭ skribmaniero estas ĝusta, ĉar nia eminentulo, inkluzive d-ro Zamenhof, ĝin uzis. Pli korekte estus diri, ke tiuj vortoj estis ĝustaj, kiam tiu eminentulo ilin uzis. Kiam Zamenhof eldonis la unuajn verkojn, la Fundamentan Krestomation (1903), la Fundamenton (1905) ktp., li estis parolinta sian lingvon nur kun malmultaj aliandanoj, kaj la unua Internacia Kongreso de Esperanto jam ne estis okazinta, kaj tial Esperanto jam ne havis sufiĉe da forto kaj sufiĉe da memstarebleco. Zamenhof mem tiam jam ne absolute regumis ĝin kaj jam ne povis „pensi en Esperanto“, sed li pensis en sia nacia lingvo kaj tradukis siajn tiujn pensojn en Esperanton. Jen la sama peketo, kiu faras ĉiu, kiu parolas aŭ skribas lingvon, kiun li ne scipovas sufiĉe longtempe.

Sed se oni komparas la stilon de la postaj Zamenhofaj verkoj kun liaj verkoj el la komenca epoko, oni vidas ke tiu malbonaĵo intertempe tute malaperis. Tamen, ĉar fakte Zamenhof, en la komenca epoko, jam ne havis sufiĉe da praktiko kaj da sperto en la uzado de Esperanto, eĉ en la Fundamento kaj en la Fundamenta Krestomatio troviĝas granda nombro da malkorektaĵoj.

Kompreneble, ĉiuj malkorektaĵoj apenaŭ malutilas al la spertulo. Ili povas eviti ilin same kiel poste povis Zamenhof sen maldespekti la Fundamento. Sed grandan danĝeron tiuj malkorektaĵoj signifas por la novulo, ĉar la plimulto el niaj vortaroj kaj lernolibroj estas bazitaj sur niaj ĉefaj klasikaj verkoj (la Fundamento kaj la Fundamenta

faktoro por artefarita lingvo, sed pli grava faktoro estas la logikeco! Oni do uzu „gis“, „dum“, „antaŭ“, „anstataŭ“, „krom“, „por“, „sen“ ktp. nur kiel prepozicion, sed uzu kiel konjunkcion „gis ke“, „dum ke“, „antaŭ ol“, „anstataŭ ol“, „krom ke“, „por ke“, „sen ke“ ktp., samkiel oni diras „malgraŭ la varmeco“, sed „malgraŭ ke la suno staras malalte“ (86/1).

En la § 3 de la Fundamento estas eldirita: „La komparativo estas farata per la vorto „pli“, la superlativo per „plej“...“. Tiu ĉi regulo estas tre mallonga, sed klara. Tamen, multaj malkorektaĵoj komparativaj kaj superlativaj troviĝas en la F. K. Por bone komprenigi tiujn nekorektaĵojn, mi diras ke „plej“ estas la pli alta grado de komparado de „pli“, kaj la uzmaniero de pli devas nepre respondi je tiu de „plej“, kaj inverse. Tiel same kiel oni korekte diras: „la ventego blovis plie terure“ (140/4) kaj „membroj kiuj plej nian helpon bezonas“ (205/11), oni ankaŭ devus diri: „Mi vin ne pli longe maloportunos“ (167/14) kaj „mi ankoraŭ plie volas manĝi“ aŭ „mi ankoraŭ pli multe volas manĝi“, sed ne „mi ankoraŭ pli volas manĝi“ (67/28). Oni nur povas formi komparativon kaj superlativon (per simpla „pli“ aŭ „plej“) de adjektivoj, adverboj kaj participoj, ĉar ĉi tiuj lastaj estas kvazaŭ adjektivaj aŭ adverbaj formoj. Aŭ oni devas trakti „pli“ kaj „plej“ kiel radikojn kaj aligi finiĝojn (o, a aŭ e). Ekz.: „mi ne deziras plion“ aŭ „malsato estas la pleja sufero“ aŭ „mi plej vin amas ol...“. La multnombraj komparativaj verbaj formoj en la F. K. do estas malĝustaj: „oni povus pli diri“ (36/20), „mia filino pli volas homon“ (62/17), „tenorojn oni pli renkontas en la landoj sudaj“ (179/34), „mi ne vidados pli la florojn“ (46/33) ktp. Ankaŭ ne estas korekte simple diri: „sur la tero vivas pli da virinoj ol da viroj“, ĉar „pli“ kaj „plej“ estas aŭ radikoj, kiu ne povas esti uzata memstare sen finiĝo, aŭ ne

Nordalbinga Esperanto-Ligo.

En Husum grupo nove fondita. Grupo en Rostock aliĝis. — La 5. majo estis la jarkunveno okaze de la Nordokcidentgermana Kongreso en Harburg. Rezentataj 7 grupoj kun 204 membroj. Plej grava decido: Pliiĝigo de la jarkonferenco de 40 al 300 pfenigoj po persono. La jarkunveno 1922 okazos en Wismer.

Esperanto en Hamburgo.

La 24. majo okazis parolado de d-ro Wohlstadt pri Esp. en Internacia Virina Ligo por Paĉo kaj Libereco. La 2. junio en loka gruparo diskutito pri la uzo de -io anstataŭ resp. apud -ujo kaj pri delego de naciaj delegitoj al la internaciaj kongresoj de Esperanto.

D-ro Giesswein parolas en Hungara Nacia Kunveno por Esperanto.

En la kunsido de la nacia kunveno de 10. junio s-o d-ro Giesswein parolis pri la nova eduka sistemo. Interalie li diris, ke krom al nacia solidareco oni devas eduki la infanojn ankaŭ al solidareco de l' homaro. Nur tiam oni povos eviti, ke la nacioj staru konstante armitaj unu kontraŭ la alia, kio minacas finfine kun la perdo de la tuteŭropa kristana kulturo. Oni komprenas vere sian propran gepatran lingvon nur tiam, kiam oni ellernas fremdan lingvon. Oni lernas sian propran lingvon mekanike. Oni komencas vere pripensadi nur tiam, kiam oni lernas fremdan lingvon. La interlatigo de la popoloj estas necesaj, kaj pro tio oni bezonas la ellernon de fremdaj lingvoj. La plej simpla rimedo por tiu ĉi celo estas la ellerno de la lingvo Esperanto.

Dudkeilo.

Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj (Dudkeilo) en Zaragoza, 26. — 29. majo, eksterordinare sukcesis. Ĝi estis firma paŝo al la sukcesigo de Esperanto en Hispanujo; ĉar per la kunveno ni nin montris de vidpunkto neatendita de la publiko, kiu multe atentis pri nia agado. S-o J. Mangada Rosenörn reprezentis la hispanan militistaron. Estis tre interesaj temoj, pri kiuj oni konkludis. Gravaj paroladoj okazis, precipe tiuj de s-o Sancho Izquierdo, prof. de Zaragoza Universitato, pri Universaleco de la Juro kaj Esperanto, kaj de s-o Romulo Rocamora pri ekonomia kaj sociala problemoj (ĉi tiu s-o estas nacia instruisto kaj advokato, kaj prezidento de Barcelona Esp. Societo). La urbestro de Zaragoza malfermis la kunvenon, kaj la rektoro de la Universitato fermis ĝin per elokventega parolado, kaj li rimarkigis la povon specialan, la ardon de Esperanto, la internan ideon, kiu faras nin nevenkeblaj. La grupo de El Pardo (Madrid) organizos nian unuan kongreson por la venonta jaro en Madrid-Pardo. J. M. R.

Esp. Kongreso en Ameriko.

La 14-a Jara Kunveno de Esp. Asocio de Norda Ameriko okazos en Boston la 12-16. julio 1921. Adreso: Miss Jennie Goldings, 507, Pierce Building, Boston 17, Mass.

Turismo.

Esp. kurso ĉe Miskolcz'aj turistoj.

S-o Laszlo Spiró paroladis en „Gyopar Turista Egyesület“ (Gyopar Turista Asocio), sekcio Miskolcz (Hung.) pri Esperanto kaj gvidas kurson kun 15 partoprenantoj. La kursgvidanto direktas al la tutmondaj turistoj-esperantistoj (asocio) kaj opaj turistoj) je la istanta peton, ke ili sendu gratulajn insiĝojn, je la okazo de alpreni

forigebla parto de adjektivo, adverbo aŭ participo. Tiu lasta regulo ankaŭ koncernas la esprimojn „kiel eble pli“, „kiel eble plej“, „pli kaj pli“ ktp. Tre ofte ankaŭ „pli“ erare estas uzata anstataŭ „pli“: „mi ne vidados pli la florojn“ (46/53), „li vidis pli nenion“ (155/12), „la supraĵo ne radios pli lumon“ (185/6), „la raketoj sin ne levadis pli, la paflegoj jam pli ne fondris“ (42/7), „si ne povis pli elteni“ (44/24), „la sinjorino ne estis pli videblaj“ (151/51) ktp. Grava eraro rilate al „plej“ estas la sekvanta: En Franca lingvo la superlativo estas formata per „le plus“ aŭ „la plus“, kaj tial ĝi ne ekzistas sen artikolo difinita en Franca lingvo. Tia formigo estas malkorekta en Esperanto kaj tamen ofte trovigis en la F. K. Pro tio estas nekorekta Esperanto, se oni diras ke „en la domo estas la plej bele“ (40/10), „si meritas ĉiam laŭdon, la plej multe“ (36/1), „kio la plej multe plaĉis al mi“ (37/29), „kiu devis ankoraŭ la plej longe atendi“ (37/33), „si la plej multe sentis deziregon“ (38/18), „la plej multe ŝi observadis la regionon“ (42/51), „vi min amas la plej multe“ (54/1), „la plej multe plaĉas al mi“ (113/2), „la stelo de la imperiestro brilas la plej bele“ (143/3), „la plej poste tie restis unu sinjoro“ (146/18), ktp. — Alia afero estas, se al la superlativo sekvas substantivo kiu postulas difinitan artikolon. En tiu ĉi kazo antaŭ la superlativo povas stari artikolo, sed tiu ĉi ne apartenas al la superlativo sed al la substantivo; ekz.: „jen la plej granda monto“, aŭ se la substantivo estas elisita por ne ripeti ĝin, ekz.: „tiu ĉi vido estas la plej bela“ (38/28), sed ne estas korekte diri: „jen li, plej maljuna infano“ (94/25), „kaj plej mallonga vojo estas eltrovita“ (98/15), ktp. — Grava ankaŭ estas la regulo ke ne al ĉiuj adjektivoj, adverboj kaj participoj oni povas aldoni „pli“ aŭ „plej“, t. e. la vortoj kiuj per si mem jam estas

de Esperanto, al sekvanta adreso: „Gyopar Turista Egyesület“, miskolci alosztalya, Miskolcz, Hungario.

Ekurso al „Insulo Bela“.

La esp. grupo de Locarno ekskursis la 5. junio al Isola Bella en Lago Maggiore (Italio), vizitis la mirindan kastelon de princo Borromeo kaj renkontis samideanojn de Busto Arsizio. Okazis vigla propagando. Revenante oni vizitis la ĉarmar urbeton Pallanza.

Gazetaro.

L' HUMANITE. Paris. 7. junio.
La ĉefa franca komunista ĵurnalo. Kun artikolo pri „la movado esperantista“.
LE POPULAIRE. Paris. 14. junio.
Granda socialista ĵurnalo, enhavas artikolon pri lingvo internacia kaj speciale pri Esperanto, de E. Lanty.
ESSENER ALLG. ZEITUNG. Essen, Germ. 9. junio.
Enhavas artikolon pri la geseigo de aŭstraj infanoj de hispanaj esperantistoj.
FRANKFURTER MESSZEITUNG (Foĝgazeto Frankfurt). 11. junio.
EUGENIA. Barcelona. Junio.

Recenzeio.

LIBROJ.

DAS DEUTSCHE LIED IN ESPERANTO. (La germana kanto en Esperanto.) Germanaj kantoj esperantigitaj. Kompilis Friedrich Pillath. 82 pg. 4 1/2 x 6 1/2 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59. Prezo: bele kartonita 6 mk.
Fine ni posedas la jam de longe atenditan kolekton de vere bonege tradukitaj germanaj kantoj. S-o Pillath zorgis kompilis la perlojn por la kantaro, kiu enhavas 62 tekstojn de germanaj popolkantoj kaj plue kelkajn internaciajn kaj diversajn kantojn, entute 69. 12 teksto el la kantrezoro estas tradukitaj de la kompilinto mem. La unua parto de la kantaro konsistas el germanaj popolkantoj, la dua enhavas germanajn kantojn por unuopa voĉo kaj en la tria ni trovas internaciajn ktp. kantojn, tiel ke la kolekto estas uzabela ĉe festaj okazoj de ĉiu speco.

Antaŭ nelonge s-o P. tradukis multajn poemojn de Heine (Elektilaj Poemoj); li majstre solvis tiun taskon, kaj mi certe ne plu bezonas atenti pri la fakto, ke la tekstoj de la germana kantareto estas same bone tradukitaj aŭ prilaboritaj. La verkinto speciale atentis la muzikan akcenton. Pro tio li faris ankaŭ malgrandajn ŝanĝojn ĉe kelkaj el la jam ekzistantaj tekstoj, intencante doni al la germana gesamideano kiel eble plej perfektan verketon. Kaj tia ĝi estas.

La bonan kanteblecon mi mem spertis okaze de la X-a kongreso de germanaj esperantistoj en Essen. Dum la amuzaj kunvenoj (dumtage kaj ankaŭ — dumnokte) ni sonigis la kantojn kun veraj ĝojoj kaj ĝuo tiam ofte, ke ni fine scipovis ilin parkere. Jes, — „sano al la bonaj ĝekantantoj“!

Samideano Faber el Stolberg liveris la arte desegnitajn kovrilojn de la libro; ĉarma knabino estis la modelo. Liutludante ŝi sidas en herbejo, kaj antaŭ ŝi, sur bastono, dolĉe trilas fringo. Kia idilio kaj kia harmonio inter homo kaj besto, kiuj amikiĝis per muziko!

La Plejpotenca donacis al ni la bonhumoron kaj la kanton. Ni do kantu dum niaj kunvenoj, dum festoj kaj dum ekskursoj migrante tra la bela mondo. Kaj ni esperantistoj — ni kanta Esperante. Estas ne nur granda pluzoro por ni, sed ankaŭ propagando por nia kara lingvo, se ni trovigas inter neesperantistoj.

La kantaro plenumos sendube sian celon. Eĉ negermanaj samideanoj havos almenaŭ imageton pri niaj belaj popolkantoj aŭdante la version en modula esp. traduko. Konsilante al ĉiuj ĝekantemuloj havigi al si la rekomendindan verketon, mi certigas ilin, ke neniu pentos pri tio. S-o M. Hankel, la prezidanto de la Esperantista Literatura Asocio, nomis la kantareton prave „bukedo da kampofloroj“ (G. Ajul.)

GAZETOJ.

AMERIKA ESPERANTISTO. Majo.
Kun ilustr. artikolo pri Praha. Daŭrigo de diplomacia vortaro. Enlanda kroniko. Aldono pri la 14-a kongreso de Esp. As. de Norda Ameriko en Boston, 12-16. julio.
ESPERANTA FINNLANDO. Junio.
Kun ilustrita artikolo pri Tallinn, la ĉefurbo de Estonio.
NEDERLAND-ESPERANTO. N-oj de 5., 12., 19. kaj 26. majo. Adreso de l' administracio: Spitaalstr. 3, Zutphen.
LA VERDA OMBRO. Aprilo.

superlativoj, ekz.: „ĉefa“, „sola“, „nura“ ktp. Sekve estas neĉesece diri: „la plej ĉefaj stratoj de Pekino“ (185/20).

La regulo ke ne ekzistas duobligo de konsonantoj en Esperantaj radikoj ankaŭ havas kelkajn necesajn esceptaĵojn facile eviteblajn. Krom la duobligo de konsonantoj en antaŭnomoj (voknomoj), pri kiuj mi parolos poste, nur ekzistas la sekvantaj tiaj vortoj: „Finnlando“, „bullo“ (186/28), „regatto“, „Gallo“, „buddisto“ (191/13). Por eviti la „nn“ en „Finnlando“ kaj la derivitaj vortoj, oni nur kutime skribi ĉiujn landnomojn kaj derivitajn vortojn per majuskulaj literoj en la komenciĝoj (laŭ Angla modelo). Per tio krom la sencio de la frazo ankaŭ la skribmaniero montras la diferencon inter „Fina“ kaj „fina“ (tiel same kiel inter „Ĉeka“ kaj „ĉeka“). Sed kial ni ne simple nomas ĉiujn landon „Suomoj“ (anstataŭ „Finnlando“) laŭ la nomigo en la lando mem? — „Buddisto“ estas ano de Buddha, kaj, anstataŭ ol elias la „h“, oni povus elias unu „d“ kaj skribi la nomon „Budha“ kaj la anon „budhano“ aŭ „budhaano“. — „Bullo“ estas „registra scilgo“ kaj povus esti nomata tiele, aŭ esti presata *bulle* [kursive] kaj skribata „bulle“ [inter inversitaj komoj**]. — „Gallo“ povus tiel same bone esti nomata „Golo“ laŭ la Franca „Gaul“ kaj „Gaulois“. Kaj „regatto“ povus esti nomata „regato“, ĉar Zamenhof ofte, por eviti konfuzojn, aligis kelkajn literojn de la origina radiko, ekz.: „kataĵumbo“ (225/7) (F.: „catacombe“, A.: „catacomb“, G.: „Katakombe“), „rimedo“ (F.: „remède“, A.: „remedy“), „stupo“ (G.: „Stufe“, A.: „step“), ktp. — Rilate la antaŭnomojn „Anneto“ (122/15), „Ella“ (146/7), „Siella“ (155/25), „Fanny“ (157/9), ktp. oni devus serĉi la originan nomon de kiu tia nomo estas derivita,

** inversitaj komoj = G.: Anführungszeichen, A.: inversed commas, F.: Guillemets.

LINGVO INTERNACIA. Aŭg. 1914 ĝis dec. 1920.

6 1/2 jaroj en unu volumeto! Tiu lasta numero de la fame konata antaŭmilita esp. gazeto enhavas tre legindajn artikolojn, kaj oni devas bedaŭrigi, ke ĉi tiu bonege redaktita revuo nun estas definitive mortinta. Ĉu definitive? Esperable la esp. movado baidadi denove ekfloros tiom, ke ankaŭ „L. I.“ estos revekata al nova daŭra vivado. INFORMA BULTENO de Cherson'a Esp. Societo. Majo. En rusa lingvo.

Sciigoj al Instruistoj.

Al ĉiuj instruistoj venontaj al la Dresden'a Antaŭkongreso.

La 28-an de julio, je la 3-a posttagmezo, okazos la ĉefkunveno de nia Esp. Asocio de Germ. Instruistoj. Tagordo intencita: 1. Raportoj de la estraro kaj kasisito. 2. Regularo de la Asocio. 3. Balotoj. 4. Diversaj aferoj.

Ĉe la lasta punkto oni preparolos pri la legolibro por infanoj, pri la farotaj proponoj kaj deziroj por la Praha ĉefkongreso pro la fondaĵo de la „Internacia Pedagogia Asocio“ kaj la refondaĵo de la „Internacia Pedagogia Revuo“.

La kunveno estas malfermata per leciono kun infanoj, versate en la 9-a popolernejo, kie estos ankaŭ la kunveno, aŭ „Weisse Schiefe“, ambaŭ tute proksime de la „Vereinshaus“. Oni demandu la 28-an en la „Akceptejo de Vereinshaus“ pro nia kunveno ktp!

Ni atendas krom la germanaj gekolegaj antaŭ ĉio la eksterlandajn samlakanon, kiujn ni per tio invitas korege. Ni tre ĝojus pri la elparolado dum kaj post la kunveno.

Ĝis revido en Dresdono!

Informetelajn linas la sekretario de la Esp. Asocio de Germ. Instruistoj E. Friebe, instr. det. UEA, Residenzstr. 24, I. Dresden-Dobritz, Saksujo.

Al la germanaj ĝekonstruistoj en la popolernejoj.

Kiel ano de la propaganda komitato en la G. E. A. mi prilaboras la esp. aferojn en la popolernejo. Mi petas pro tio la gesamfakanojn, informi min pri novaj infankursoj, pri la opinio de la gepatraj konsilantaroj pri esp. instruado, plue pri ĉiuj sukcesoj en la afero „Esperanto kaj Popolernejo“. La faritaj raportoj aperos ĉiujmonate en la „Esp. Angulo“, kiun disdonas la grupoj al la loka gazetaro. Samtempe la Esp. Asocio de Germanaj kaj Saksaj Instruistoj estos informata pri la alsenditaj raportoj el Germanujo. Oni sendu ĉiam al E. Friebe, instr., det. UEA, Residenzstr. 24, I. Dresden-Dobritz, Saksujo.

Germana Esp. Kongreso 1922 en Breslau.

Travivita la X-a! Vivu la XI-a! Mi ne troigis en Essen: La ĝojo de miaj esp. amikoj povi akcepti la XI-an en Breslau, la bela urbo apud la verda bordo de l' Oder, urbo de mezepokaj konstruaĵoj-kaj-arto-trezoroj, estas sincera kaj granda. Kaj kiel ni mem jam serioze komencis labori, tiel ankaŭ ĉiu opa de la karaj gesamideanoj „eklaboru“, t. e. komencu ŝpari por sia kongresa kaso. „Panpecetoj farigas pano“, diris la silenziano.

La Loka Ligo de la Breslaŭ'aj Esp. Unuigoj elektis por la kongresa laborokomitato la s-ojn eklezian konsilistan moŝton Becker, komerciston Siegmund Freund, superan fervojan sekretaron Habellok, superan burĝernejan instruiston Hanuschke kaj la subsigninton.

Adreso por aliĝoj ktp.: kongres-sekretario supera burĝerneja instruisto Hanuschke, Breslau, Hedwigsstr. 11. Oni bonvole almetu poŝtmarkojn por la respondo. La kongrestagoj ankoraŭ ne estas fiksitaj. M. Mielert.

Kongresanoj por Praha, traveturantaj Kolonjon

(precipe el Anglujo, Francujo, Belgujo, Nederlando kaj Hispanujo) ricevos informojn ktp. en la oficejo de la Esp. Societo de 1906 en Köln (Kolonjo), Hohestrasse 26.

La esperantistoj en Köln ĝojus, se ili povus saluti multajn samideanojn en sia fama antikva urbo, okaze de la traveturo al Praha.

kaj Esperantigi ĉiujn originan nomon, sen konsideri la hodiaŭn formon de la koncerna nomo en la diversaj naciaj lingvoj. Ekz.: „Anneto“: la nomo estas derivita de la Hebrea „Hana“, aŭ estas mallongigo de la Germana „Johanna“, „Johanna“ estas inigo de „Johann“, kio Esperante estas „Johano“. En Esperanto oni tial tie bone povus diri „Johanino“, „Hanino“, „Hama“, „Hana“, „Hano“, „Hanjo“, „Hanjo“, aŭ ĉe Ana aŭ Ano, ĉar la sencio de la frazo kaj la komenca majuskulo de la nomo montras ke ne temas pri „ano“.

(Daŭrigata)

Sercedemandoj

de Leo Fiedler, Breslau.

1. Kio estas tio? Oni iras en butikon, devas longtempe atendi, antaŭ ol oni estas servata, rigardas la objektojn, sed oni aĉetas nenion aŭ nur malote, ĉe oni ankoraŭ lasas tie ion, kion oni posedis, kaj pagas malgraŭ tio ĉio.
Tio estas barbutiko.
2. Ĝi portas sian sinjoron kaj estas portata de sia estraro. Kio estas tio?
La sandalo.
3. Ĝi posedas tian fortecon, ke li povas haltigi vagonaron per unu mano?
La lokomotivo.
4. Kiu diferenco estas inter anglo kaj vianbrogelo?
„ouff“ ankaŭ „ouff“.
5. Kio estas pli nuda ol nuda, tiel nuda, ke ĝi krakas?
La sketo.
6. Kio estas pli rapida ol penso?
Jam.
7. Kiam ĉambro havas vigan tapetornamenton?
Kiam malantaŭ la tapetoj svarmas la cimoj.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

RAKONTOJ. Al. Mexin, Montreux, Svisujo, 65. Grand Rue, petas sendi al si esperantigitajn rakontojn el ĉiulandaj infanaj legolibroj. Respondos per bela vidaĵo el Svisujo aŭ alia svisa aĵo, laŭ deziro esprimota.

PETO. 2 junaj antverpenaj instruistoj deziras migri per biciklo tra Germanio al Ĉeĥoslovakio dum sia granda libertempo (aŭgusto-septembro). Volontege ili loĝas unu nokton ĉe diferencaj samideanoj dum la migrado. Kiu bonvolus akcepti ilin, estas afable petataj skribi al s-o Fr. Lotry, Wilrycksche vest 76, Antverpeno, Belgio.

SENPIEDLULO, invalido, tre volus korespondi kun iu kuracisto-kirurgiisto (samideano) pri amputacio de piedoj kaj pri mekanikaj piedoj, tiel nomataj „protezoj“ aŭ deziras seligi pri adreso de konata germana kirurgisto. Nikolao Saharov, poŝto Soroga de Tvera gubernio, vilaĝo Ulici, Ruslando.

ESP. LERNEJA LIBRO. POR FACILA LEGADO. Baldaŭ aperos „Unuaj Paŝoj“, lerneta libro por facila legado: rakontetoj el ĉiuj landoj, proverboj kaj sentencoj. Sin adresi al Alexandra Mexin, 63, Grand Rue, Montreux, Svisujo.

LIGO POR PACO INTERNACIA, 4 Princeton Street, London, W. C. 1. — Sendu vi respond-kuponon por sciigo.

ŜANĜO DE ADRESO. Roman Sakoviĉ, antaŭe en Lodz, nun loĝas en Nowogrodek, Polio, Sad Okregowy.

EDZIGOPETO. Tridekjaraulo deziras edziĝi al fraŭlino aŭ vidvino, kiu laboras por la esp. lingvo; ŝi devas esti preskaŭ samaĝa. Sendu portreton, poste mi sendos la mian. Mi estas laboristo. S-o Mariano Donto, str. Prado 110, Habana, Kuba.

Korespondoj kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpresado kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

Fraŭlo Jozefo Benagez, Esp. Grupo, Centro de Dependientes, str. Prado 61, Habana, Kuba insulo, deziras korespondi kun gesamidanoj de ĉiuj landoj por ilustr. poŝtkartoj kaj leroj pri ĉiu afero. Mi ĉiam kaj tuj respondos.

S-o Camillo Verstrepen, instruisto, Belgio, Antverpeno, Wilrycksche vest 76, deziras korespondadi per leroj kaj poŝtkartoj ilustr., precipe kun Germanujo kaj Ĉeĥoslovakio; ĉiam respondos.

F. Cesarini, del. UEA, Potenza (Italio), deziras korespondantojn de ĉiuj landoj por siaj gekursanoj kaj gesamgrupojn.

S-o Constant Faugeras, 15, rue de la Présentation, Parizo, Francujo, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondas.

S-ro J. Uehleha, adm. oficisto en Skrivany apud Novy Bydzov (Bohemio) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiujn germanajn plebscitajn, Württemberg, de ordinaraĵoj ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu speco laŭ katalogo Michel 1920.

Jiri Frankenberger, del. UEA, Bytčička, Slovakio, interŝanĝas poŝtkartojn kaj lerojn kun turistoj de la tuta mondo.

S-o S. E. Risku, Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo; ĉiam respondas.

S-o Lauri Kaini, Laihla, Finnlando, nur interŝanĝas poŝtmarkojn.

Kongresanoj. Mi deziras korespondadi kun junaj fraŭlinoj, kiuj partoprenos la XIII-an kongreson en Praha. D-o Karlo Mezei, VI, Terež-körtut 4-III-7, Budapeŝt, Hungario.

S-ano Francisko Balla, Budapeŝt VI, Szondi str. 58. F. 1, intencas komenci korespondadon kun ĉiulandaj laboristoj pri ĉiu ajn temo, per ilustr. poŝtkartoj kaj iom poste per leroj; certe respondos.

S-ano Georgo Pomian, Budapeŝt IX, Dondar str. 24-II-18, korespondas kun ĉiulandaj laboristoj precipe kun marmorb-urbanoj, per ilustr. kartoj kaj leroj; nepe respondos.

S-ano Arono Meszaros, Budapeŝt I, Fehervary ut. 35, F. 1, korespondas kun ĉiulandaj laboristoj pri la vivkondiĉoj kaj pri aliaj temoj, per leroj kaj ilustr. kartoj; nepe respondos.

S-ano Johano Rádicsz, Budapeŝt IX, Boraros ter 3-III-6, korespondas kun ĉiulandaj seriozaj laboristoj nur per leroj; tuj respondos.

S-ano Stefano Szalay, Budapeŝt VI, Petehozsi str. 31, F. 6, deziras korespondadi kun ĉiulandaj poŝtmark-kolektantoj kaj kun laboristoj per ilustr. kartoj; respondos certe.

Samuel Ripp, Bialystok, Polujo, Fabryczna 5, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj paperejojn kun samideanoj. Kiu bezonas bonajn polajn poŝtmarkojn kaj paperejojn, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj paperejojn kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Bialystok (Pol.), ul. Jurowiecka 5.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝtmarkojn de „Fiume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj paperejojn, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 5, Bialystok, Polio.

Lwow (Polio), str. Sw. Zofii 44, s-o Fr. Zachariasiewicz, liveras 100 malsamajn poŝtmarkojn polajn por sendo de 5 sviz. fk., 200 poŝt. pol. por sendo de 25 sv. fk.; aŭstrajn kaj germanajn kun subskribo Poŝta Polska, plebscit. ruĝa kruco ktp., ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn laŭ katalogo de Michel 1920.

S-o Jan Bratkowski, Bydgoszcz, Polio, Gidanska 2, u. p. Czerwionka, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), poŝtmarkoj, gazetoj esp. kaj naciaj.

S-o A. Smura, Bydgoszcz, Polio, Podolska 20, deziras korespondi kun lumondaj gesamidanoj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, paperejojn; ĉiam respondas.

Junuloj. Por kurso de junaj gesinjoroj, 18-20 jara, mi petas alsendadon de poŝtkartoj ilustr., esperantaĵoj, gazetoj ktp. kiel vigiligiloj. Alilandaj komencantoj, lernantoj estas petataj doni sian adrecon por korespondado. Hermann Theobald, Aliona-Steenkamp, Im Haag 18, Germanio.

S-o Paul Becher, poŝtoficisto, Köln, Germ., Burgundersstr. 7, deziras korespondadi per leroj kaj poŝtkartoj kun gesamidanoj en ĉiu lando.

Grupestro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, Breslau 15, Germ., kaj 40 fervoeregaj novuloj deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn kaj leroj. Tuj kaj la tutan jaron ĉiam ili respondas.


S-o Kurt Bulekowsky, Gabitzstr. 166, Breslau 18, Germ., interŝanĝas poŝtmarkojn kaj vidaĵkartojn kun ĉiuj eksterlandanoj; ĉiam respondas.

S-o Gerhard Kaiser, Arletiusstr. 28, Breslau 2, Germ., deziras korespondi kun gesamidanoj el Azio, Palestino, Australio kaj Ameriko; ĉiam respondas.

Korespondado per poŝtkartoj ilustr. aŭ leroj kun gesamidanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Michael Wieland, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Waldweg 21. Certe respondos.

ARGENTINIO.

Reprezentado de ĉiusepacaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentinia Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la fiaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentiniojn, irapasoje okcident-kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantioj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Kelety, Szászsebes (Sebesul Sasesc), Transsilvanjo, Rumanio; poste: Kelety-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentinio.



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO FOIRO

POR TEĤNIKO KAJ KONSTRUKO
Aŭtuna Foiro 1921 de la 28-a de aŭgusto ĝis 3-a de septembro
Printempa Foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto

La centra merkato por la internacia komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozicioj kaj por aĉetantoj

Informoj donas kaj aligajn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN

IN LEIPZIG

(Foiraĵejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO,
. LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵoj kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.
15:20 aŭ 29:39 cm * dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.
Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 5 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambio de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,
HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

Hermann Theobald, Aliona-Steenkamp, Im Haag 18, Germ., deziras korespondi per leroj kaj poŝtkartoj ilustritaj, nur kun eksterlandanoj kaj anoj de novaj ŝtatoj.

Richard Schütze, Plauen i. V., Germ., Antonstr. 31, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Tuj kaj certe respondos al ĉiuj.

Kiu sendos al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj germ. poŝtkartoj Carl Kueper, Düsseldorf 3, Germ., Graf Adolfsstr. 11.

S-o Anton Skopiniski, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 169, deziras korespondi kun s-anoj en la tuta mondo.

S-o Leono Funken, Florinsmarkt 7a, I-a etg., Koblenz, Germ., kolektas kaj deziras interŝanĝi germanajn helpmonbiletojn. — Li kolektas ankaŭ vidaĵojn de alilandaj famaj artmonumentoj (pm. bfl.) kaj sendos por ĉiu tia belan vidaĵon de sia hejmurbo. Li certe respondos.

Prof. Sauerborn, Köln, Siebengebirgs-Allee 32, deziras interŝanĝi stampitajn kaj nestampitajn poŝtmarkojn kontraŭ samnombraj germanaj poŝtmarkoj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

Korespondado per poŝtkartoj ilustr. aŭ leroj kun gesamidanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Ludwig Goppel, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Ludendorffstr. 35. Certe respondos.

S-o Franz Levy, Zimmerstr. 4a, Breslau 5, Germ., deziras interŝanĝi vigle poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj escepte Anglio, Francio kaj Rusujo; ĉiam respondas.

S-o Berthold Heinrich, Steinstr. 46, ptt., Breslau 23, Germ., interŝanĝas vidaĵkartojn koloritajn kaj poŝtmarkojn. Tuj kaj ĉiam respondos.

Izaak Szapiro, Zoppot apud Danzig, poste restante, deziras korespondi kun germanoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn, paperejojn kaj monbiletojn.

S-o Max Butin, Godesberg a. Rhein (Germ.), Kronprinzenstr. 55, interŝanĝas poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Mi donas ankaŭ helpmonbiletojn aŭ ilustr. poŝtkartojn kontraŭ poŝtmarkoj; ĉiam respondos.

S-o Jozsef Krehnyay, polica inspektoro en Diosgyőr-Vasgyar (Hungario), deziras korespondi kun ĉiulandanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leroj.

O. Sklenčka, Delegito de UEA, Hradec Králové Ĉeĥoslovakio

peras kaj prizorgas ĉiusepacajn aferojn kaj rilatojn: komercajn, informajn, interŝanĝajn ktp. inter fremdlando kaj Ĉeĥoslovakio. Bonvolu uzi miajn fidindajn servojn!

Spertaj Esperantistoj el ĉiuj landoj

serĉataj kiel pagotaj helpantoj por la eksterlanda organizo de eldonejoj de eksport-adreslibroj.



Estas en preparo:

Eksport-Adreslibroj

de la germana elektro-industrio 2 volumoj, 5-lingvaj,

de la germana industrio de metal-artikloj 4-lingve,

de la germana industrio de delikataj metaloj (bijuterio, or- kaj arĝentaĵoj) 4-lingve,

de la germana industrio de ludiloj, 4-lingve, de la tuta industrio de maŝinoj kaj instrumentoj, 6-lingve.

* Jam mendebla estas:

Eksport-adreslibro de la ledo-industrio de Offenbach, 4-lingve.

* Seriozajn ofertojn kun detaloj (Esperanto korespondanta) sendu al:

Auslands-Werbe-Dienst Kaiser Wilhelm Passage 18, Frankfurt a. Main (Germ.)

Internacia organizacio de fabrikantoj kaj komercantoj

Agrikulturajn Maŝinojn


estas fondata! La interesojloj kunvenos dum la XIII-a Kongreso.

Informojn donas

Fr. Barth,

ĉe firmo „Agraria“ en Bratislava, Ĉeĥoslovakio.

Razaparatoj
por poŝto, el latuno argentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.



Lasta novaĵo: Bruligilo „Patent-krajono“ n-ro 116, uzebila kiel bruligilo same kiel krajono. Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetantoj menu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

Al ĉiulandaj gefervojistoj.

Estante aranĝantino de faka kunveno de fervojistoj ĉe la XIII-a Unversala Kongreso Esperantista en Praha, mi petas ĉiulandajn gefervojistojn pri ablastaj proponoj rilate tiun ĉi laboron. Cion sendu (kun respondkuponon aŭ neuzitajn poŝtmarkojn) al Sidonie Dlouhá, fervoja oficistino, Praha 15, Stacidomo de Wilson.